# TEJO-aktuale: numero 104, 2003-03-17

---

T E J O - A K T U A L E N-ro 104 (17 Marto 2003)

---

Senpaga informletero de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
<http://www.tejo.org>;

---

1. TEJO-AKTUALE-KONKURSO: JEN LA GAJNINTOJ
2. TRADUKU INFORMILON POR LA RETA INFORMADO-CENTRO!
3. "ESPERANTO LINGVO ARTA" EN RUSIO
4. INTERNACIA SEMINARIO EN GERMANIO

---

1. TEJO-AKTUALE-KONKURSO: JEN LA GAJNINTOJ

Lotumiĝis la gajnintoj en la konkurso per kiu TEJO-aktuale festis sian 100an numeron: la novan TEJO-T-ĉemizon ricevos Anna-Laŭra H. Wickstroem (Francio) kaj Kapinga Ntumba (Zimbabvo). Gratulon!

---

2. TRADUKU INFORMILON POR LA RETA INFORMADO-CENTRO!

Ni planas traduki al naciaj lingvoj ĝisdatigitan version de la malnova informilo de TEJO "Kio estas esperanto". Se vi emas helpi, vi povas tre facile fari tion, rekte per la TTT-paĝo <http://www.tejo.org/info/kio.php>;. La rezultantaj dokumentoj elŝuteblos, en PDF-formato, el la retejo por esperanto-informantoj "Reta Informado-Centro" <http://www.ikso.net/ric>;.

---

3. "ESPERANTO LINGVO ARTA" EN RUSIO

Komence de Marto okazis en Novosibirsk (okcidenta Siberio, Rusio) la junulara festivalo EoLA ("Esperanto - Lingvo Arta"). En la jaro 2004, EoLA plej verŝajne okazos fine de februaro en Volgograd (suda parto de Eŭropa Rusio).
E-junularo de Novosibirsk: <http://www.nekmovado.boom.ru/ESP/esp.htm>;.
E-junularo de Volgograd: <http://stelaro.by.ru/index_esp.html>;.

---

4. INTERNACIA SEMINARIO EN GERMANIO

Naŭmburg (Germanio), 27.12.2003 - 03.01.2004: 47a Internacia Seminario (IS). Temo: "Naturmedio - strukturo, ekspluato, protekto". La aliĝilo jam troviĝas ĉe <http://www.internacia-seminario.de/is_aliĝilo.pdf>;.
La retpaĝo kaj la reta aliĝilo sekvos post kelkaj semajnoj.

---

TEJO-AKTUALE - Senpaga informletero de TEJO

La ideo: <http://www.esperanto.org/tejo/publikaĵoj/aktuale/koncepto.html>;.
La arĥivo: <http://www.tejo.org/tejo-aktuale>;.
Informojn kaj komentojn sendu al <tejo-aktuale-red@esperanto.org>.
La teamo de TEJO-aktuale estas:
Oleg Izjumenko, Jevgenij Gaus, Giuseppe Castelli.
Tiun ĉi numeron redaktis Giuseppe Castelli.
Pri TEJO-aktuale ĉe www.abonu.com zorgas Slavik Ivanov.